

Ora Ĵurnalo

Numero 43, Septembro 2021



"Ostindiefararen Götheborg" survoje al Stokholmo 2021-08-16.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Gard Nergaard, norvega muzikisto, kiu iam vizitis la esperantoklubon de Gotenburgo... 20
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Katuŝa, militkanto en la rusa kaj en esperanto..... 21
Espeporko meditas.....	3	Kjell Erik Arvidsson..... 23
”Ostindiefararen”.....	4	Humuro estas rimedo elteni malbonajn aferojn..... 24
Estrarkunsido de la Esperanto-Societo de Gotenburgo, la 22an de aŭgusto en Gråbo....	6	Elektronikaj revuoj..... 25
Vizito el Stokholmo al la gotenburga klubo 19 aŭgusto.....	7	La Bulteneto – dulingva magazino en Vieno 28
Vizito al Stokholmo	8	Rakonto pri la trovo de la ora montrezoro de Podmoklo..... 28
Parenckunveno la 14an de aŭgusto en 2021.....	8	”Ĉiuj steloj etas nokte” – enhavas mikronovelojn..... 29
Subtenu Esperanton ĉe la estontekonferenco de Eŭropa Unio	9	El Göteborgs-Posten, dimanĉe la 12an de septembro..... 30
Pri la Librorondo.....	12	Sufikso -um 30
La diversaj aĝoj de l’ homo.....	12	Sur eta insulo – Inga rakontas..... 31
Pomofromaĝo	13	La velboato..... 32
Skribkonkurso dum septembro–novembro 2021.....	14	Josef Kříž – kiel mi esperantiĝis 33
Götaälvsbron – La ponto de Göta Älv.....	14	Inbjudan till esperantokurs..... 37
La Gotenburgaj Koloristoj – Göteborgskoloristerna	16	
La naiva artstelo – Den enfaldiga konstcuppen.....	19	

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝarangô: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





Espeporko meditas



- ☆ Kiel ŝparporko mi ja devus interesiĝi pri ekonomio kaj moneroj. En vilaĝo en Ĉeĥio, kamparano en la 18a jarcento trovis grandegan montrezoron.
- ☆ Mi deziras, ke UEA trovu montrezoron, ĉar mi aŭdis ke oni pro ekonomiaj problemoj havas planojn vendi la domon en Roterdamo kaj fordoni sian bibliotekon kaj arkivon al Aŭstrio kaj Slovakio. Eble saĝe – ni sciu!
- ☆ La bildo sur la unua paĝo montras la ŝipon Götheborg, forlasante Gotenburgon por veli al Stokholmo. Eble estos poste nova velado al Ĉinio!
- ☆ Gotenburgo havas riĉan kulturon. La Artmuzeo estis celo por vizito, ekzemple kiam gastoj venas. Ingegerd komencis novan serion pri la Gotenburg-koloristoj. Ne preterpasu la stultan ŝtelon de fama pentraĵo!
- ☆ Por doni lokon al novaĵoj oni foje devas malkonstrui malnovaĵojn, ekzemple la Göta Älv-Ponton el 1939.
- ☆ Gazetoj prenas lokon en ĉi tiu numero: Temas pri Mölndals-Posten, Västsahara kaj La Bulteneto – kaj Ora Ĵurnalo ja ĉiam ĉeestas. ☺
- ☆ "Ĉiuj steloj etas nokte" estas novverkita libro kun mikroniveloj. Principe ĉiu novelo ampleksas malpli ol duonan paĝon. Tamen oni povus imagi tutan vivon en kelkaj. Vere bona legado por streĉaj homoj. Ne preterpasu la eblecon aŭskulti kiam Paulo S. Viana prezentas la libron. Lia elparolo estas tre klara.
- ☆ Klara estas ankaŭ la voĉo de knabineto kantanta Katuŝa, rusan militkanton. Eta knabino en strikta milituniformo kun militistoj en la fono – kia stranga kombino!
- ☆ Kaj laste ni konatiĝu kun Josef Kříž kaj lia vojo al Esperantujo. Ĉiam estas interese legi pri individuaj spertoj. Ni bonvenigas pliajn kontribuojn de vi, karaj legantoj!
- ☆ Ett särskilt tack till Dag Fransson och Birgitta Ling-Fransson för de fina bilderna vi fått att använda från Dags resa till Kina.
- ☆ Bonan legadon! /Siv



La aŭtuno alvenis.
Foto de Jan Hellström pri *Amanita fúlva*.

”Ostindiefararen”



Estas historio pri la fatala ŝipo kiu grundis ĉe ”Hunnebådan” en la Gotenburga enirejo de la haveno en la jaro 1745. La originala ŝipo konstruiĝis en la ŝipfarejo ”Terra Nova” en Stokholmo kaj surakviĝis en 1733.

Tiu ŝipo faris tri vojaĝojn al Ĉinio sed en 12 septembro 1745 la ŝipo estis averiinta nur 900 metrojn ekster sia celo en Gotenburgo.



La historio rakontas ke la kapitano devis pasi inter la vergoj, la kompatinda kapitano. Estis la printempaj superakvoj kiu kaŭzis la fatalan akcidenton. Tamen la plej multo de la ŝarĝo estis savita kaj dum jaroj oni povis vidi la vrakon starantan sur la grunda fundo ”Hunnebådan”.

Tempo flugas kaj la ŝipo foriĝis. En la jaro 1984 oni retrovis la vrakon kaj la granda aventuro komenciĝis. La novkonstruita dua ”Götheborg” estas la plej valora okazo de la nuna, Gotenburga historio laŭ mia opinio.

La unua vojaĝo de la nova ŝipo okazis en 2 oktobro 2005 je 13h45.

La vojaĝo al Ĉinio komenciĝis, levu la ankron kaj hisu la velojn!

La ĵurnalisto Dag Fransson, kiu raportis al GP dum la marvojaĝo, devas kuraĝigi sin por grimpi en la mastoj. Li havas timon pri altaĵoj,



Dag Fransson grimpante.



li konfesis dum prelego. Do, li estis brava viro, por la unua fojo li mastgrimpis!

La plej bela vidaĵo estas rigardi oldan ŝipon velantan sur la maro kun plenaj veloj. Sed devas esti bravaj maristoj por kuraĝi grimpi



ekster la ŝipo, pendante en la vantoj alte super la maro.

Ĉu estis solece malproksime en la velstango? Kompatinda maristo super la maro! Ĉu la ŝnuroj estas solidaj? Ne timu, la ŝipo estas novkonstruita...



Fine la ŝipo alvenis en Ĉinion – eble estis la superkargo kiu kontrolis la aferojn? Jes certe. Ĉu la ŝipo devas kvaranteniĝi? Kiu scias?

La bildo en paĝo 1 montras la ŝipon vojaĝante al Stokholmo meze de aŭgusto en ĉi tiu jaro 2021. Tiu estas la unua vojaĝo post ses jaroj en haveno. Finfine la grandega ŝipo ekvelis denove!

/Ingegerd



”La velŝipo Magdalena”, kanto de la grupo Kajto:

<https://www.youtube.com/watch?v=7pRrRtsOcOI>

”Ni hisu la velojn”, kanto de la grupo ”Kajto”:

<https://www.youtube.com/watch?v=9Ylse9mDYts>

”Så länge skutan kan gå” med Sven-Bertil Taube:

<https://www.youtube.com/watch?v=01dugHReArl>



Vivuon por la ŝipo "Ostindiefararen"!

Estrarkunsido de la Esperanto-Societo de Gotenburgo, la 22an de aŭgusto en Gråbo



Ingegerd, Ann-Louise, Magnus.

*Tra la fenestro de la altano videblas Andreas,
Margareta kaj Ingegerd.*

Nepras havi bildojn por ke vi – post tro longa tempo – rekonu nin! Mankis Inga kaj Jan-Ove. Mi fotis.

Ann-Louise Åkerlund vizitis nin, ĉefe por ordigi la dokumentojn de la malestablita Esperanto-Instituto, kiuj troviĝis en la Stannum-biblioteko. Poste la dokumentoj venis al la Arkivo de Societoj en Gotenburgo.





Ann-Louise, Magnus kaj Andreas.



Margareta, Ingegerd, Ann-Louise (kaŝita) kaj Magnus.

Grâbo 22 aŭg. 2021 /Siv

Vizito el Stokholmo al la gotenburga klubo 19 aŭgusto

Soile Lingman, esperantistino el Stokholmo vizitis Margareta kaj ankaŭ la esperanto-bibliotekon de Stannum kaj la Artmuzeon de Gotenburgo.

Sur la bildo dekstre: Soile Lingman, Margareta Andersson kaj Helfrid Karlsson. Siv Burell fotis.

Sube la broŝuro pri la ekspozicio de pentraĵoj, faritaj dum la tempo inter la unua kaj la dua mondmilitoj.



Landoj kiel Britio, Nederlando, Germanio, Belgio kaj Svedio estis reprezentitaj. Estis amuze vidi zepelinon super la tegmentoj, virinoj en plisitaj jupeoj kaj restoracio, kie la virinoj surhavis ĉapelojn kaj kie preskaŭ ĉiu fumis. Ni ŝatis la lertecon de la pentristoj. Bonege: oni povis vidi kion la pentraĵoj prezentis. Tamen oni bezonas plurajn horojn por finstudi la ekspozicion, kiu finiĝos la 19an de septembro.



Kiun vojon ni iru? La artmuzeo estas granda.



Antaŭ ol la trajno al Stokholmo alvenis, ni havis tempon por kafumi. Liza, la filino de Margareta (en striita pulovero) trovis nin en la kafejo Croissant.

Vizito al Stokholmo

Lige al la parenckunveno de la familio Burell, mi, Siv, vizitis Kerstin Rhodin kiu jam de kelka tempo havis viziton de sia filo Pär-Johan, loĝanta en Aŭstralio. Mi havis tre agrablan tagon en Brandbergen. Aŭtune Kerstin eble venos al Esperanto-Sabato en Gotenburgo por rakonti pri siaj filmoj – vera kulturevento! /Siv



Parenckunveno la 14an de aŭgusto en 2021

Preskaŭ 90 el la posteuloj de August (1844–1927) kaj Lotta (1845–1917) Burell troviĝis sur la nomlisto.



Mi staras plej maldekstre kun mia nepo Adam.

Ni vizitis la devenlokojn de la familio Burell-Knutby kaj Sotter en Uplando. Poste ni ĉiuj piknikis kaj babiladis en la herbejo de Björkögården, Björkö.

Mi ja nur estas apartenanta al la familio de mia edzo. Mi neniam interesiĝis pri genealogia serĉado – ĝis nun. Sur 128 paĝoj en la libro dekstre mi "ĉeestis" la vivon de farmistoj, servutbienuloj, soldatoj, tajloroj, kaj ŝuistoj.

Junaj virinoj kutime estis servistinoj ĝis ili edziniĝis, kaj post la geedziĝo la laboro daŭriĝis pri kaj kun infanoj. Estis sukcesoj kaj malsukcesoj.

Ĉio okazis en la fono de la regado de la lando, la tribunaloj, la elmigrado, la epidemioj, la vakcinado, la liberaj eklezioj, la konstruado de familiejoj k.t.p.

Ĉu troviĝas esperantistoj inter la partoprenintoj? Verŝajne mi estas la sola. /Siv



La ĵus eldonita libro pri la parenkaro de August kaj Lotta Burell, verkita de Mats Burell.

Subtenu Esperanton ĉe la estonteco-konferenco de Eŭropa Unio

Louis v. Wunsch-Rolshoven – al "Esperanto informas".
(Bv. plu disvastigi al retlistoj, unuopuloj, sociaj retoj...)



Saluton, karaj Esperanto-parolantoj, kiel vi eble jam eksciis, Eŭropa Unio pripensas sian estontecon, kadre de estonteco-konferenco kiu daŭras ekde majo 2021 dum unu jaro.

En la aktuala unua fazo de la pripensado civitanoj rajtas meti proponojn kaj subteni tiujn de aliaj.

Estas bone por ni Esperanto-parolantoj kaj por nia lingvo, se en tiuj pripensoj oni konsideras ankaŭ Esperanton.

Sekve sur la paĝoj de la estonteco-konferenco estas multaj proponoj pri Esperanto. Mi alvokas vin subteni almenaŭ unu el tiuj, se vi ne jam faris (bv. elteni por tio la iomete komplikan aliĝoproceson).

Zamenhof donacis al ni sian mirindan lingvon, kiun ni ĉiuj ĝuas – de tempo al tempo ni iomete subtenu lian projekton.

Diversaj proponoj celas la enkondukon de Esperanto, la instruadon de Esperanto kiel

Kära vänner som talar Esperanto, som ni kanske redan vet, reflekterar EU över sin framtid i samband med sin framtidskonferens, som sträcker sig från maj 2021 och året ut.

I den aktuella första fasen i betänkandet har medborgarna rätt att komma med förslag och stödja andras. Det är bra för oss esperantotalande och för vårt språk, om man i dessa betänkanden också innefattar Esperanto.

Följaktligen är det i framtidskonferensens sidor många förslag om Esperanto. Jag uppmanar dig att stödja åtminstone ett av dessa, om du inte redan har gjort det. (Försök stå ut för sakens skull med den något komplicerade anslutningsprocessen.)

Zamenhof gav oss sitt underbara språk, som vi alla njuter av – och då och då något understöder hans projekt.

celon en si mem aŭ kiel unuan ŝtupon por lerni aliajn lingvojn.

Mi mem havas la impreson, ke unue necesas bazaj ŝtupoj; jen miaj proponoj.

(Ili cetere estas en la angla por atingi, ke multaj eŭropanoj povas rekte legi ilin; eblas aŭtomata traduko en la retejo.)

– **Oficiale rekoni Esperanton flanke de Eŭropa Unio** kiel unu el la lingvoj de Eŭropaj civitanoj:

<https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955>

Bedaŭrinde ĝis nun Eŭropa Unio neglektas tian rekonon kaj en la prezento de la lingva situacio de Eŭropo nia lingvo Esperanto kutime mankas.

– **Oferti unu aŭ du lerneajn instruhorojn pri Esperanto** al kiel eble plej multaj lernejoj en Eŭropo:

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/39238>

La misinformado pri Esperanto estas terura kaj estus tre bone, se jam en la lernejoj oni informus almenaŭ baze pri Esperanto kaj ĝia nuna uzado.

– **Objektive informi pri Esperanto** kaj samrajte trakti Esperanto-parolantojn pri lingvaj aferoj en EU:

<https://futureu.europa.eu/processes/ValuesRights/f/12/proposals/41119>

Estas tre ĝene legi kiajn misinformojn la Eŭropa Komisiono disvastigis kaj plu disvastigas pri Esperanto. Ili bonvolu interalie akcepti, ke nia lingvo jes havas florantan kulturon – cetere multe pli internaciecan ol la angla.

– **Konscii pri la lingva diskriminacio ene de Eŭropa Unio** kaj pri ĝiaj konsekvencoj por la demokratio en EU:

<https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/44420>

86 ĝis 90 % de la nederlandanoj, danoj kaj svedoj parolas la anglan, kontraste nur 20 ĝis 33 % de la hungaroj kaj hispanoj, bulgaroj kaj rumanoj, italoj kaj poloj (laŭ enketo de Eurobarometer en 2012).

Ĉar la angla estas la plej uzata lingvo en EU, estas tre verŝajne ke sekve la influo de la diversaj nacioj al la decidoj de EU estas tre

Olika forslag syftar till att införa Esperanto, alltså undervisning i Esperanto som ett mål i sig eller som det första steget för att lära sig andra språk. Jag själv har intrycket av att man först behöver börja från basen; här är mina förslag. (De är för övrigt på engelska för att många europeer direkt ska kunna läsa dem; det är möjligt att få en automatisk översättning på nätet.)

– **Att officiellt erkänna Esperanto hos EU** som ett av språken för EU-medborgare:

<https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955>

Tyvärr har EU hittills inte brytt sig om att erkänna Esperanto och i presentationen av Europas språksituation, saknas vanligtvis vårt språk Esperanto.

– **Att erbjuda en eller två lektionstimmar i Esperanto** för så många elever som möjligt i Europa:

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/39238>

Felinformationen om Esperanto är fruktansvärd och det skulle vara mycket bra, om man redan i skolorna skulle informera, åtminstone grundläggande om Esperanto och dess nuvarande användning.

– **Att objektivet informera om Esperanto** och med samma rätt behandla esperantotalande, då det gäller språkfrågor i EU:

<https://futureu.europa.eu/processes/ValuesRights/f/12/proposals/41119>

Det är mycket irriterande att läsa om vilka felinformationer Europakommissionen har spritt och fortsätter att sprida om Esperanto. De borde åtminstone vara vänliga att acceptera, att vårt språk har en blomstrande kultur – och f.ö. är mycket mer internationellt än engelskan.

– **Att vara medveten om språkdiskrimineringen i EU** och dess konsekvenser för demokratin i EU:

<https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/44420>

86–90 % av holländare, danskar och svenskar talar engelska, vilket däremot bara 20–33 % av ungrare, spanjorer, bulgarer och rumäner, italienare och polacker gör (enligt en enkät i Eurobarometer 2012).

malsama. Tio bedaŭrinde neniel kongruas kun la celoj de demokratio.

Ne estas pura hazardo, ke la lingvokono de la angla estas tiel malsame distribuita en la ŝtatoj de Eŭropa Unio – ja estas tiel, ke ekzemple la nederlanda kaj la angla estas tre proksimaj lingvoj, dum la pola aŭ hungara estas multe pli malproksimaj de la angla. Sekve la lernotempo kaj lernopeno pri la angla estas tre malsamaj por la diversaj eŭropaj civitanoj – evidente granda maljusteco.

Ankaŭ por Esperanto la lernotempo estas malsama depende de la gepatra lingvo. Sed ĉar Esperanto estas lernebla en proksimume kvarono de la tempo por la angla, la diferenco inter la diversaj nacioj estas multe pli malgranda.

Esperanto tial estas multe pli justa ol la angla.

En la praktiko de la Esperanto-vivo oni povas vidi, ke partoprenas multaj homoj kun tre diversaj gepatraj lingvoj. Ankaŭ en la Esperanto-literaturo oni klare vidas, ke ĝin kreas homoj kun plej diversaj gepatraj lingvoj, dum la angla beletra literaturo estas kreata preskaŭ nur de angla-denaskuloj.

Mi tre ŝatus, se vi subtenus unu aŭ plurajn el miaj proponoj.

Mi ankaŭ bonvenigas diskutojn kun vi pri la proponoj. Se mi ne reagas al via komento en iu retlisto, bv. rekte alskribi min; eble mi pretervidis.

La proponoj cetere ĝis nun kolektis respektive (en la supra sinsekvo) 183, 62, 41, kaj 32 subtenojn; ni vidu ĉu kaj kiom kreskos.

☺

Ĉion plej bonan al vi kaj multan ĝuon de nia komuna lingvo Esperanto!

Lu Wunsch-Rolshoven

Komisiito pri gazetaro kaj publikaj rilatoj de Germana Esperanto-Asocio EsperantoLand prezidanto.

Fakte estis facile trovi la eniron por apogi la kvar proponojn. /Siv

Eftersom engelskan är det mest använda språket i EU, är det mycket troligt att olika nationers inflytande på EUs beslut är mycket olika. Tyvärr överensstämmer detta på intet sätt med demokratimålen.

Det är inte bara en slump, att språkkunskaper i engelska är så ojämnt spridda i EU:s stater.... det är ju så att t.ex. holländska och engelska är mycket närliggande språk, medan polska och ungerska, är mycket mer avlägsna från engelskan. Följaktligen är lärotiden och ansträngningen att lära sig engelska mycket olika för olika europeiska medborgare – uppenbarligen en stor orättvisa. Också för Esperanto är lärotiden olika, beroende på modersmålet. Men då Esperanto går att lära sig på ungefär fjärdedelen av tiden för engelska, är skillnaden mellan olika nationer mycket mindre. Esperanto är på så sätt mycket mer rättvist än engelskan.

Rent praktiskt kan man i esperanto-sammanhang se, att många människor med mycket olika modersmål deltar. Också i esperantolitteraturen ser man klart, att människor med många olika modersmål skapar den, medan den engelska skönlitteraturen skapas av nästan enbart engelskfödda.

Jag önskar starkt att du ska stödja ett eller flera av mina förslag.

Jag välkomnar också diskussioner med dig om förslagen Om jag inte reagerar på din kommentar i någon nätlista, ber jag dig att skriva direkt till mig, kanske har jag missat något.

Förslagen har för övrigt hittills samlats resp. (i den ordning länkarna står) 183, 62, 41 och 32 stöd; vi får se om och hur mycket det växer. ☺

Jag önskar dig allt gott och att du får mycket nöje av vårt gemensamma språk Esperanto!

Lu Wunsch Rolshoven

Kommissionär för tidskrifter och offentliga relationer för Tyska Esperantoförbundet Esperantolands ordförande.

Pri la Librorondo



Valoras havi paperan libron por esti libera legi en la ĝardeno, en la trajno kaj en ajnaj lokoj.

La ĉapitro sep estis iomete pli mallonga ol la aliaj. Krom ke oni lernas amajn kaj amorajn vortojn oni lernas pri la historio. Ni lernis pri la (fi)fama parolo de Charles de Gaulle, kiam li diris: "Vivu la libera Kebekio!" Ni ankaŭ lernis pri la verkisto Raymond Schwartz kaj pri liaj amuzaj vortludoj. Ekzemple en la sekva poemo:

LA DIVERSAJ AĜOJ DE L' HOMO



de Raymond SCHWARTZ

En supra ĉambro, lulo ... lulo ...
Anĝele dormas la etulo:
Etaĝo.

Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras
Kaj pri la bela mondo miras:
Miraĝo.

Jam ne plu sidi li tamburas,
Sed tra la dom' explore kuras:
Kuraĝo.

Kun vundoj li (kaj sen rubandoj)
Revenas el stratbubaj bandoj:
Bandaĝo.

Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo
Knabinon ĉien sur la vojo:
Vojaĝo.


Al ŝi li donas sian nomon
Por fondi kune novan domon:
Domaĝo.

Li tiam estas tre utila
Fortika viro, kvankam vila:
Vilaĝo.

Kaj post rapida tempopaso
Postrestas nur senviva maso:
Masaĝo.

P.S.

Ni ne apliku al Virino
Ĉi tiun viv- kaj rimosaĝon,
Ĉar de l' komenco ĝis la fino
Ŝi ĉiam havas saman aĝon:
Avantaĝo.



Ankaŭ komponistoj estas menciitaj de Sten Johansson. Se oni donas al si tempon gugli pri ĉiu nomo oni fariĝus tre sperta. Sed ne eblas. Mankas tempo.

Sed jen kantoj de Brassens: Ĉu li estas la egalaĵo de Schwartz? = Almenaŭ li amuzas min: Gerges Brassens –

https://www.youtube.com/playlist?list=OLAK5uy_k_opYMR7bXzCvu-VR_RmuzwmQshQ1z7Tg /Siv

Pomofromaĝo

En la lasta librorondo oni ankaŭ parolis pri litovia recepto pri pomofromaĝo. Nun aŭtune ja konvenas fari ĝin. Jen recepto el interreto kun alĝustigoj de nia litova librorondanino:

INGREDIENCOJ:

5 kilogramoj da pomoj (sen haŭto kaj semoj)
1 kilogramo da sukero

METODO DE PREPARADO:

Prepara tempo: Pli ol 1 horo.

1. Fajne haki la pomojn kaj meti en grandan poton. Dum movado, varmigu en malferma poto ĝis la pomoj bolos ĝis solida kaĉo. Pecoj de pomoj ne estu videblaj. Bolante, la maso iomete malheliĝos.
2. Poste aldonu la sukeron kaj kuiru, senĉese moviĝante, ĝis la maso ekdensiĝos. La tuta procezo povas daŭri ĉirkaŭ 2 horojn aŭ eĉ pli. Kiam la maso restas surloke post balaado de la fundo de la poto per kulero – la maso estas boligita. La konsistenco de la kaĉo ankaŭ povas esti kontrolita metante kulereton de la kaĉo sur teleron – konvene kuirita kaĉo ne kuras flanken kaj tuj malmoliĝas.
3. La kuirita maso povas esti metita en sakojn aŭ ujojn tegitajn per pergamena papero, formante la deziratan formon. Maldikigu la fromaĝojn ĝis ĉirkaŭ 1 cm dikeco.
4. Kiam la fromaĝo malvarmiĝis kaj malmoliĝis (post ĉirkaŭ unu tago), forigu ĝin de la sako aŭ pergameno kaj sekigu ĝin en varma loko (proksime al radiatoro aŭ ie varme), foje turniĝante. Ĝi povas esti sekigita metante ĝin sur tabulon kaj metante lignan kuleron sub la fromaĝon. Aŭ vi povas sekigi sur krado. Ĉi tio plifaciligos la fromaĝon kaj la surfaco malpli gluiĝos.



5. Envolu la sekigitan fromaĝon en pura tuko kaj lasu ĝin en varma kaj seka loko. Ju pli longe la fromaĝo staros, des pli ĝi maturiĝos kaj gustos.

✪✪

Jes, tiu recepto de la poma fromaĝo, kiun Andreas trovis rete, estas bona.

Tamen, kiam mi preparas ĝin, mi dispecigas senŝeligitajn pomojn, surverŝas sukeron kaj bone miksas ĉion.

Kiam aperas fluaĵo (poma suko kun sukero), mi verŝas tiun en apartan ujon. Kaj mi ripetas la verŝadon kelkfoje dum 12 horoj.

Poste mi kuiras la fluaĵon ĝis kiam restas nur duono de ĝi. Kaj nur tiam mi aldonas la pomojn. Eblas restigi kelkajn kulerojn de ili por la fino de la kuirado. Tiam la fromaĝo iĝas pli diverskolora. La kuirado de la kaĉo poste estas simila al supra recepto. Nur ĝi daŭras pli mallonge ol laŭ tiu recepto. Fine de la kuirado eblas aldoni dispecigitajn nuksojn, sunflorajn semojn, sezam-semojn, linajn semojn aŭ papavon – laŭ gusto...

Posta proceso samas...


Sukcesan preparon! Fotu poste la rezulton!

Amike, Vida



Skribkonkurso

dum septembro–novembro 2021



Temo: "Somera memoraĵo 2021"




Partoprenu en la skribkonkurso de Ora Ĵurnalo!

Kontribuu al OĴ antaŭ 1/12 2021.
Skribu pri via somera memoro!
Ĉiuj skribaj ĝenroj estos akceptitaj.
Bonvenon!

Bv. sendi vian kontribuon al siv.burell@gmail.com La redakcio legos la artikolojn. Ne forgesu skribi vian nomon, retadreson kaj telefonnumeron!

/Ingegerd

Götaälvsbron – La ponto de Göta Älv



En 1935 oni komencis konstrui la ponton, kiu por mi ĉiam validos kiel Hisingsbron (la Ponto de Hisingen).

Mi scias ke jam antaŭ tiu jaro ekzistis malnova ponto, kiu estis malkonstruita. Tiu ponto ne havis klapon, sed "svingigis",

1935 började man bygga den bro som för mig alltid kommer att gälla som "Hisingsbron". Jag vet att det redan innan detta år fanns en gammal bro som revs.

Den bron hade ingen klaff utan "svängde" när den lät båtar passera. Både denna bro

permesante boatojn pasi. Kaj tiu ponto kaj la lasta aldono, devas pardoni min pro tio.

Mi ja ne diras ke la nova ponto ne estas bezonata kaj nuntempe certe ne estas iu, kiu malkonfesas ke ĉiuj ligoj al Hisingen estas bezonataj. Tamen estas kun malĝojo en la koro, kiam mi vidas kiel la malkonstruado de "mia" Hisingsponto daŭras.

Kion oni do malkonstruas? Jes, estas 927 metroj da vojo kun 20 metra larĝeco kaj la cetera rubaĵo, kiun tio sekvigas.

La unua trafikakcidento temis pri glatiĝeco tiutempe kiam ne ekzistis vojsalo. Personaŭto estis faranta preterveturon de kamiono kaj havis joron. Dank' al la fakto ke li joris kontraŭ la pontoparapeton li evitis iri en la riveron Göta Älv la 16an de decembro 1939.

La plej amuza historio eble estis kiam la gazeto Göteborgs-Posten, la unuan de aprilo, diris ke Gotenburgo ricevis viziton de malofta kastorego, kiu mordetis la pontofostojn, jes troviĝis bildo pri la difektoj, sed kiu povus kredi ion tian. Kion oni kontraŭe povus kredi, estas ke Götaälvbron estas klapa ponto kiu ligis Hisingen kun la ĉeftero.

Nils-Einar Eriksson estis unu el la elektitaj arkitektoj, kiuj formis plaĉe kurban pontoligilon. Nuna arkitekto kuraĝis fari proponon pri konservado de la ponto kiel urba parko kun kultivadoj kaj parceloj kaj kial ne promenejoj.

Jes, pri kio oni ne povus revii por havi pli verdan Gotenburgon.

La propono pri konservado por tiu celo tamen fiaskis kaj mi ne scias ĉu la proponfaranto Tomas Lundberg mem kredis je sia propono.

La malkonstruado komenciĝis en julio ĉijare kaj intense daŭras plentempe, kiam mi nun skribas.

/Ingegerd

och det senaste tillskottet får ursäkta mig för detta.

Jag säger ju inte att den nya bron inte behövs och i dagens läge är det väl ingen annan heller som förnekar att alla förbindelser med Hisingen behövs. Det är dock med stor sorg i hjärtat som jag ser hur rivningen av "min" Hisingsbro fortskrider. Vad är det då man river? Jo, det är 927 meter väg med 20 meters bredd och allt vad det innebär av annat skrot.

Den första trafikolyckan handlade om halka på den tiden när det inte fanns vägsalt. En personbil skulle köra om en lastbil och fick sladd. Tack vare att han sladdade mot broräcket slapp han att hamna i Göta Älv den 16:e december 1939.

Den roligaste historien var väl när Göteborgs-Posten en första april påstod att Göteborg fått besök av en sällsynt jätdebäver som gnagt på bropålarna, ja, det fanns bild på skadorna... men vem kunde tro på något sådant. Vad man däremot kan tro på är att Götaälvbron var en klaffbro som förband Hisingen med fastlandet.

Nils-Einar Eriksson var en av de utsedda arkitekterna som formade en behagligt svängd broförbindelse. En nutida arkitekt vågade ställa förslag om bevarande av bron som stadspark med odlingar och kolonilotter och varför inte promenadstråk.

Ja, vad kan man inte drömma om för att få ett grönare Göteborg.

Förslaget om bevarande för detta ändamål kom dock på skam och jag inte vet jag om förslagsställaren Tomas Lundborg själv trodde på sitt förslag.

Rivningen började i juli i år och pågår för fullt i skrivande stund.

/Ingegerd



Åke Göransson naskiĝis en Veddige en Halando la 24an de aprilo en 1902.

Dum sia tempo kiel pentristo, oni kunkalkulis lin unu el la plej elstaraj reprezentantoj por la "Gotenburgaj koloristoj".

Lia aktiva pentroperiodo komenciĝas kiam li estas akceptita ĉe la pentrolernejo de Valand kiel lernanton en 1924. Tie li havis Tor Bjurström kiel instruiston ĝis 1937, kiam li estis enhospitaligita en la psikmalsanulejo de Lillhagen.

Åke elkreskis en laborista urboparto en Gotenburgo. Tie granda familio kun infanoj devis interpuŝi en unuĉambra loĝejo.

La patrino de Åke, kiu estis solpatrino, vivtenis siajn kvar filojn en ĉi tiu medio.

Post la lernejo li dure laboris ĉe razejo de mateno ĝis vespero kaj rapide avancis. Fine, post edukado, li fariĝis frizisto.

Flanke li studis arthistorion.

En la jaroj 1920–21 li trapasis plenan kurson pri libermana desegnado gvidata de Gotthard

Åke Göransson föddes i Veddige i Halland den 24:e april 1902.

Under sin tid som målare räknades han till en av de allra främsta representanterna för "Göteborgskoloristerna".

Hans aktiva målarperiod börjar då han antas vid Valands målarskola som elev 1924. Där hade han Tor Bjurström som lärare fram till 1937 då han intogs på Lillhagens mental-sjukhus.

Åke växte upp i en arbetarstadsdel i Göteborg. Där kunde en stor barnfamilj trängas i en enrummare.

Åkes mamma, som var ensamstående, försörjde sina fyra söner i denna miljö.

Efter skolan slet han hårt vid en raxalong från morgon till kväll och avancerade snabbt. Till slut, efter utbildning, blev han frisör.

Vid "sidan av" studerade han konsthistoria. År 1920–21 genomgick han en fullständig kurs i frihandsteckning för Gotthard Sandberg via korrespondens på Hermods.

Sandberg per korespondada kurso de Hermods.

En 1923 li translokiĝis al Dals Ed kie li daŭrigis kiel frizisto, sed ankaŭ havis plian tempon por pentrado.

En Dals Ed li renkontis Inga Andersson, naskita en Norvegio, sed kun svedaj gepatroj. Ŝi fariĝis lia sola amo kaj patrino de liaj infanoj.

Ree en Gotenburgo li fariĝis parttempa lernanto ĉe Tor Bjurström ĉe la pentrolernejo de Valand. Estis tiam, kiam li ekkonis kelkajn el la aliaj koloristoj.

En la jaro 1927 la unuaj signoj pri psika malsano ekis, kaj en 1928 la artstudoj finiĝis pro la malsano.

Li ricevis la diagnozon skizofrenio kaj fariĝis homevitema, distrita kaj suferis pro manko de dormo.

Ekde 1930 li loĝas kune kun sia patrino kaj frato en apartamento en Landala. Estas tie kaj tiam ke li atingis la kulminan punkton de sia pentrado.

Troviĝas kvindekaj da pentraĵoj kiuj estas pentritaj dum ĉi tiu periodo.

En 1937 la psika malsano superregis kaj denove li estas flegata en la malsanulejo de Lillhagen ĝis sia morto.

Kun plene evoluita skizofrenio kaj pezo je 48 kg, li mortas la 8an de novembro 1941.

Ni povus fini ĉi tie, sed citaĵo de Gotthard Johansson, kiu vidis la grandecon de Åke Göransson, sentiĝas pli pozitiva:

”Ne nepras diri troigajn vortojn pri tiu arto. Ĝi parolas por si mem per sia arda, moderigita kaj intensa lingvo”.

La artistecon de Åke Göransson valoras esti memorita ankaŭ en la 21a jarcento.

Ni akompanos Ivan Ivarsson, Ragnar Sandberg kaj Inge Schöler en la venonta numero.

/Ingegerd

1923 flyttade han till Dals Ed där han fortsatte som frisör men också fick mer tid för att måla.

I Dals Ed träffade han Inga Andersson, född i Norge, men med svenska föräldrar. Hon blev hans enda kärlek och mor till hans barn.

Tillbaka i Göteborg blev han deltidselev hos Tor Bjurström vid Valands målarskola. Det var då han lärde känna några av de andra koloristerna.

År 1927 visade sig de första tecknen på sinnessjukdom och 1928 avslutades de konstnärliga studierna med anledning av sjukdomen.

Han fick diagnosen schizofreni och blev folkskygg, disträ och led av sömnlöshet.

Från 1930 bor han med sin mor och en bror i en lägenhet i Landala. Det är där och då han når höjdpunkterna i sitt måleri.

Det finns ett 50-tal målningar som målats under denna period.

1937 tar den psykiska ohälsan över och han vårdas återigen på Lillhagens sjukhus fram till sin död.

Med fullt utvecklad schizofreni och en vikt på 48 kilo dör han den 8:e november 1941.

Vi skulle ha kunnat sluta här men ett citat från Gotthard Johansson som såg storheten i Åke Göranssons konst känns mer positivt.

”Det är inte nödvändigt att gripa till några överord om denna konst. Den talar för sig själv på sitt brinnande, dämpade och intensiva språk”...

Åke Göranssons konstnärsskap är värt att kommas ihåg på det 21:a århundradet också.

Vi kommer att följa Ivan Ivarsson, Ragnar Sandberg och Inge Schöler i nästa nummer.

/Ingegerd

La naiva artŝtelo – Den enfaldiga konstkuppen



Knabino en blanka robo de Henri Matisse.

La naiva artŝtelo en Gotenburgo

La 19an de majo 1973 estis farita ege senhonta ŝtelo en la artmuzeo sur placo Götaplatsen.

La pentraĵo "Knabino en blanko" pentrita de Henri Matisse en 1919, kiu havis valoron de 1–2 milionoj da kronoj, estis tiam ŝtelita.

La pentraĵo estis tranĉita el la kadro kaj la ŝtelistoj fuŝe tranĉis tiel ke la subskribo ne kuniĝis.

Krom ke la nesubskribita pentraĵo daŭre foras, ĝi verŝajne ankaŭ estas nevendebla.

Je la sama tempo, oni ankaŭ provis eltranĉi la pentraĵojn "Oliva arbaro" de Vincent van Gogh kaj "Aleo" de Paul Cézanne, sed malsukcesis ankaŭ pri tio.

Mi cerbumas kiel la ŝtelistoj rigardas sian artŝtelon hodiaŭ.

/Ingegerd

Den enfaldiga konstkuppen i Göteborg

Den 19:e maj 1973 begicks en mycket fräck stöld på konstmuseet på Götaplatsen.

Målningen "Flicka i vitt" målad av Henri Matisse 1919 som hade ett värde av 1–2 miljoner kronor stals då.

Målningen hade skurits ur ramen och tjuvarna missade att skära så signaturen kom med.


Förutom att den osignerade tavlan fortfarande är försvunnen är den förmodligen också osäljbar.

Vid samma tillfälle försökte man också skära ut målningarna "Olivskog" av Vincent van Gogh och "Allé" av Paul Cézanne men misslyckades även med detta.

Undrar hur tjuvarna ser på sin konstkupp idag?

/Ingegerd

Gard Nergaard, norvega muzikisto, kiu iam vizitis la esperantoklubon de Gotenburgo



De tempo al tempo mi cerbumas pri kio okazis al junaj personoj, kiujn ni dum mallonga periodo renkontis en la klubo. Per Facebook mi foje havas informojn, ekz. pri Gard Nergaard.

Gard venis al nia klubo iun Esperantosabaton kaj originis nian kunvenon per sia violonludo. Li ankaŭ logis kelkajn el ni al muzikkafejo, kie li kun Michael Krumins (gitaro) havis muzikprezentadon. Tiam ni aĉetis "Å legge på svøm". La sonkasedo troviĝas en nia biblioteko, kaj ĝi estos aŭdebla surloke.

Jen diraĵo de Gard en Facebook (en la norvega):

Hallo! Verda brenn jo opp, kva fuglane skal ein gjera? Gi 200 kr til Framtiden i våre hender så sender eg eit eksemplar av plata/boka *Å legge på svøm* med Gard Nergaard / Michael Krumins i posten til deg! Kanskje hjelper det! Eg spanderer portoen!

Ei plate med høgtsvevande nykomponerte slåttar, gnistrande samspel og ei bok med eit univers av historier, og på toppen av det heile artwork av sjølvaste Lena Trydal!



Gard rakontis pri nova projekto. Dum multaj jaroj li revis pri ideo rekonstrui malnovan pedalan orgenon en "vojaĝorgenon". Li ja multe turneas.

En la sveda: Även om orgeln skulle slängas så hade den sentimentalt värde. Nästa dag när vi väl skruvat ihop den igen fick vi skicka en liten låt till de tidigare ägarna så de kunde vara trygga på att orgeln nu hade fått en tryggt nytt hem. De vet fortfarande inget om fortsättningen.

Jag har i många år haft en dröm om att bygga om en tramporgel, och för ett år och en dag sedan hämtade Tuva och jag en stor, gammal tramporgel i Stockholm och körde upp till Tobo med den. Efter otaliga timmars arbete är den äntligen född på nytt – som reseorgel! (...) /Gard





Jen la rezulto! Nun Gard eblas veni al vi kun la transportebla orgeno, kaj kompreneble ankaŭ kun la violono – kaj kun Michael Krumins. /Siv

Katuŝa, militkanto en la rusa kaj en esperanto

<https://youtu.be/c6eY-DRRBu0>

Josef Kříž, Ĉeĥio rakontas:

Katuŝa (ruse Катюша, esperante Katjuŝa) estas soveta militkanto pri knabino atendanta sian junulon, kiu estis prenita al milito. La muziko estis komponita en 1938 de Matvěj Blantěr kaj la tekstoj al ĝi estis verkitaj de Michal Isakovskij.

Titolo mem de la komponaĵo donis sian nomon al la sovetiaj raketlanĉiloj BM-8, BM-13 kaj BM-18 uzataj dum la dua mondmilito. Ili ankaŭ estis nomataj "la orgenoj de Stalin" pro sia kria sono.

Historio

La kanto estis prezentita unuafoje de la kantistino Valentina Batiŝčevská kaj ludita de la orkestro de Viktor Knuŝevický la 27an de novembro 1938 en la kolona halo de la Moskva Sindikata Domo. Ŝian faman famon certigis nur la konata kantisto de popolkantoj Lidija Andrejevna Ruslanova, kiu ankaŭ kantis ĝin al sovetiaj soldatoj en la orienta fronto dum la Granda Patriota Milito (= la 2a mondmilito). Laŭ iuj kritikistoj, Katjuŝa ne estas verko de Blanter, ĉar la mondkonata



muzikkomponisto Igor Fjodoroviĉ Stravinski komponis similan melodion por sia opero Mavra en 1922.

Katjuŝa estas kantata de diversaj artistoj kaj havas multajn aranĝojn, inkluzive de diskoteko, repo aŭ tekno-versio. La kanto ankaŭ havas kelkajn lingvajn versiojn, ekz. la ĉeĥan, finnan, italan aŭ hebrean. La ĉeĥa oficiala versio ankaŭ havas ŝercan parodion pri la knabino Nina, kiu volas melki virbovon. La itala versio prezentas batalon kaj mobilizan version de la kanto. La hebrea versio estis kreita en 1940. La kanto havas sian muzeon en la urbo Vŝod. La muzeo havas gramofonajn diskojn kun registroj de ĉi tiu kanto en centoj da lingvoj.

La rusa armea Alexandrov-ensemblo ankoraŭ havas ĉi tiun kanton en sia repertuaro.

Por vi prospektis kaj tradukis Josef Kříž

Foje neesperantisto demandis al mi: "Vad heter 'krig' på esperanto?" (Kiel vi diras "krig" (milito) en Esperanto?) Momente mi estis tute silenta, ne memorante la vorton.

Катюша

Расцветали яблони и груши,
Поплыли туманы над рекой;
Выходила на берег Катюша,
На высокий берег, на крутой.
Выходила на берег Катюша,
На высокий берег, на крутой.

Выходила, песню заводила
Про степного, сизого орла,
Про того, которого любила,
Про того, чьи письма берегла.
Про того, которого любила,
Про того, чьи письма берегла.

Ой, ты песня, песенка девичья,
Ты лети за ясным солнцем вслед,
И бойцу на дальнем пограничье
От Катюши передай привет.
И бойцу на дальнем пограничье
От Катюши передай привет.

Пусть он вспомнит девушку
простую,
Пусть услышит, как она поёт,
Пусть он землю бережёт родную,
А любовь Катюша сбережёт.
Пусть он землю бережёт родную,
А любовь Катюша сбережёт.

Расцветали яблони и груши,
Поплыли туманы над рекой;
Выходила на берег Катюша,
На высокий берег, на крутой.
Выходила на берег Катюша,
На высокий берег, на крутой.

Feliĉe li mem respondis: "Kompreneble ne ekzistas tiu vorto en Esperanto, ĉar ĝi estas ja paca movado."

Mi havis problemon trovi la tre konatan rusan kanton, kiu apartenas al la bildo supre. Anstataŭ mi trovis esperantan version, sed la kanto ja samas. /Siv

KATJUŜA

tradukis Konstantin' GUSEV

Pomajn florojn vento milde tuŝas,
la nebuloj flosas sur river'.

Sur la kruta bordo nun Katjuŝa
sola iras en la primaver'.

Sur la kruta bordo nun Katjuŝa
sola iras en la primaver'.

Sola iras, kante prisopiras
stepan aglon, kiu flugis for,
kaj amaton, kiun ŝi aspiras,
kies vortojn tenas en la kor'.
kaj amaton, kiun ŝi aspiras,
kies vortojn tenas en la kor'.

Ho, kanteto, kanto junulina,
flugu altan vojon de la sun'
kaj la karan en la for' landlima
de Katjuŝa korsalutu nun.
kaj la karan en la for' landlima
de Katjuŝa korsalutu nun.

Li revidu ŝin de malproksime
kaj reaŭdu kanton ŝian tuj.
Kiel amon gardas ŝi anime,
tiel zorgu li pri la patruj'.
Kiel amon gardas ŝi anime,
tiel zorgu li pri la patruj'.

Pomajn florojn vento milde tuŝas,
la nebuloj flosas sur river'.
Sur la kruta bordo nun Katjuŝa
sola iras en la primaver'.
Sur la kruta bordo nun Katjuŝa
sola iras en la primaver'.

Kjell Erik Arvidsson



Kjell Erik Arvidsson estis redaktoro de Mölndals-Posten, sed kiel pensiulo li nun vivas en Kenjo.

Sur lia retpaĝo mi trovis artikolon pri fojo kiam la nuna reĝo Karlo XVI Gustavo kaj la reĝino Silvia vizitis en Mölndal.

Mi iomete malfruas pri ĉi tiu kontribuo, sed kiel pensiulo mi pensas ke mi povas esti pardonita.

La reĝo ja havis naskiĝtagon antaŭ nelonge [skribite en majo]. La jaron 1996 mi estis la ĉefredaktoro de Mölndals-Posten kaj aŭdis "ke eta birdo pepis" ke la reĝo venos viziti nin.

Li reinaŭgurus la palacon de Gunnebo post grandaj riparadoj kaj rekonstruadoj, ne en la palaco mem, sed nova legomĝardeno estis kreita kaj finfine, finfine la urbo konstruigis la novajn servist-domojn, kiuj en pli ol 200 jaroj nur troviĝas kiel desegnoj.

Mi cerbumis pri tiu novaĵo kaj do frapis min: Ni presu libron, "Gunnebo – palaco en la tempo."

Estos ja kiel amuza eta pastiŝo de la devizo de la reĝo (Por la popolo en la tempo!). Kaj materialo ja troviĝas.

La doktoro pri filozofio Lars Gahrn ja ĉiun semajnon verkis en Mölndals-Posten pri malnovaj historioj de urbo kaj vilaĝaro. Ni elektis kvindekajn da artikoloj.

Se mankis bildoj, la tasko komisiigis al Kristina Lindahl en la redakcio fari desegnaĵojn.

Ni estis dankemaj ke ni ricevis la novaĵojn tutan jaron antaŭ la efektiva evento.

Mi redaktis, Kristina desegnis kaj Lars legis presprovaĵojn. Sukcesis, la libro estis presita kaj transdonaciĝis ĉirkaŭligita per blu-flavaj

Nu är jag lite sen med det här inlägget, men som panschis tror jag att det kan förlåtas mig.

Kungen fyllde ju år häromdagen [skrivet i maj]. Året 1996 var jag chefredaktör på Mölndals-Posten, och hörde en liten fågel kvittra i stadshuset att kungen skulle komma besök.

Han skulle återinviga Gunnebo slott efter stora renoveringar och ombyggnader, inte på själva slottet, men en ny köksträdgård var skapad och äntligen, äntligen, hade staden byggt upp de nya tjänstefolksbostäderna, som i dryga 200 år bara funnits som ritningar.

Jag grubblade på denna nyhet, och så slog det mig: Vi trycker en bok. "Gunnebo – ett slott i tiden"!

Det blir ju som en rolig liten pastisch på kungens valspråk.

Och material fanns det ju.

Fil dr Lars Gahrn, antikvarie på Mölndals Museum skrev ju varje vecka i Mölndals-Posten om gamla historier från stad och bygd. Vi valde ut ett femtiotal artiklar.

I den mån bilder saknades uppdrogs åt Kristina Lindahl på redaktionen att göra teckningar.

Vi var tacksamma att vi fått nyheten ett helt år före själva händelsen.

Jag redigerade, Kristina tecknade och Lars läste korrektur. Det lyckades, boken var tryckt och överlämnades ombunden med

silkaj bendoj al reĝaj moŝtoj en la muzeo de Mölndal.

La reĝo estis gaje parolema tiun tagon kaj kaŭzis malfruiĝojn preskaŭ ĉie, kie li estis vizitinta ĉirkaŭe en la urbo.

Lars Gahrn tute ne zorgis pri la malpermeso malkaŝi aferojn kaj faris lagome servilan parolon kun laŭdo pri reĝo kaj palaco en la tempo. Kaj tiam la reĝo fariĝis parolema denove kaj volis diskuti pri kiuj el liaj prapatroj, kiuj ankaŭ vizitis Gunnebo.

Kaj pri tio Lars Gahrn estis la ĝusta persono por rakonti.

blågula sidenband till majestäterna på Mölndals Museum.

Kungen hade varit pratglad den dagen och orsakat förseningar nästan överallt han varit på besök runt om i staden

Lars Gahrn struntade i yppandeförbudet och höll ett lagom underdånigt tal med beröm om en kung och ett slott i tiden.

Och då blev kungen pratsam igen och ville diskutera vilka av hans förfäder som också hade besökt Gunnebo.

Och det var ju Lars Gahrn rätt person att berätta om.



Lars Gahrn (kun granda barbo) transdonas la libron al la reĝo. Reĝino Silvia en la mezo. Plej dekstre Kjell Arvidsson. La 2an de majo 1996.

Humuro estas rimedo elteni malbonajn aferojn

Ŝerca bildo pri la corona pandemio, sendita al ni de **Josef Kříž, Ĉeĥio**.

La alflugintaj eksterteranoj demandas: "Ĉu vi restas nur unusola homo sur ĉi tiu planedo?"

Respondo: "Jes, ili forgesis min vakcini".



El Facebook:

*Post uzurpi la regadon,
talibano repostenigita kiel
nova trafikpolicano. 😊*

En Afganistano nova tipo de
trafik-policisto!

Ĉu vi iam vidis ridantan
talibanon? Mi ne.

Sed kion signifas la rido? /Siv

After taking over government, Taliban deployed
new traffic police personnel. 😊



Elektronikaj revuoj



Etaj revuoj plej facile povas ekzisti hodiaŭ
elektronike, ĉar la kostoj estas multe pli
malaltaj ol tiuj por paperaj revuoj.

Tidskriftsverkstan (Revulaborejo) en
Gotenburgo fondiĝis por helpi al etaj gazetoj
malaltigi la kostojn per helpo pri komputilada
scio, presado kaj certe ankaŭ per inspiro de
najbaraj revuoj. Nun Tidskriftsverkstan, kiu
ampleksas 25 membrajn revuojn, ne plu havas
la rolon de apoganto pri tekniko. La plej grava
tasko estas helpi pri merkato, ekzemple per
ekspozicio en bibliotekoj. Ora Ĵurnalo estas la
sola, kiu uzas Esperanton.

Mi volas atentigi vin pri unu el la membraj
revuoj de Tidskriftsverkstan – la revuo
Västsahara (Okcidenta Saharo), kiu havas etan
ligilon al Esperanto per la libro "La knabo, kiu
vivis kun strutoj", verkita de Monica Zak kaj
tradukita en Esperanton de Carl Olof Selenius.

Små tidskrifter har lättare att existera idag
elektroniskt, då kostnaderna är så mycket
lägre än för papperstidningar:

Tidskriftsverkstan i Göteborg grundades för
att hjälpa små tidskrifter att minska sina
kostnader genom att bistå med datorkunskap,
tryckning och säkert också genom att
tidskrifter inspirerade varandra. Nu har
Tidskriftsverkstan, som har 25
medlemstidskrifter, inte längre rollen som
teknikstödare. Den viktigaste uppgiften är att
hjälpa till med marknadsföring, t.ex. genom
utställningar på bibliotek. Ora Ĵurnalo är den
enda, som använder Esperanto. Jag vill visa dig
på en av Tidningsverkstans
medlemstidskrifter, Västsahara. Den är på
svenska, men har en liten anknytning till
Esperanto, via boken "Pojken, som levde med
strutsar, skriven av Monica Zak och översatt

Artikolo en Västsahara temas pri la libro, rakontante pri popolo – kaj ĉefe pri bestoj en la lando.

Iam Västsaharo estis hispana kolonio, sed nun la fekunda parto de Västsaharo estas okupita de Maroko. Multaj rifuĝintoj troviĝas en rifuĝkampoj en Alĝerio.

El la plej lasta magazino de Västsahara mi prenas la jenan:

till Esperanto av Carl Olof Selenius. En artikel i Västsahara handlar om boken, som berättar om folket – men huvudsakligen om djuren i landet.

En gång i tiden var Västsahara en spansk koloni, men nu är den bördiga delen av Västsahara ockuperad av Marocko. Många flyktingar finns i flyktingläger i Alĝeriet.

Från tidskriften Västsaharas senaste nummer saxar jag: följande:



Ulla-Karin Karlson Layout ullakarin.karlson@natverkstan.net

Lena Thunberg Redaktör 070-4754645 lena@vastsahara.net

Webmaster Hemsidan webmaster@vastsahara.net

”Upp till bevis för Sverige att fördöma Marockos övergrepp i Västsahara”

AV GABI BJÖRSSON · 2021–08–17

Ĉi tiu debatartikolo estis publikigita en “Omvärlden” la 8an de julio 2021:

Defendanto de homaj rajtoj estas seksperfortita de marokana policisto, kaj la mondo turnas la rigardon en alian direkton. La sveda regado devas realigi sian feministan eksteran politikon kaj agi, skribas Gabi Björsson, la prezidanto de (la help-organizo) Emmaus, Stokholmo.

Ek de la militpaŭzo inter la liberiga movado de Västsahara, Polisario, kaj la okupanta ŝtato Maroko estis rompita, Maroko malhelpis ilin forlasi siajn hejmojn, malhelpis ilin ricevi nutraĵon kaj flegadon por difektoj kaŭzitaj de la policistoj, publikigis mortminacojn kaj faris publikajn kalumniajn kampanjojn – ofte en maniero, kiu incitas al malamo kontraŭ la aktivistoj.

En novembro 2020 perforto kaj ĉikanado kontraŭ okcidentsaharaj virinoj kaj knabinoj fare de polico kaj militistaro drame kreskis. Policistoj vandalis kaj prirabis hejmojn,

Denna debattartikel publicerades i Omvärlden 8 juli 2021:

En människorättsförsvarare i Västsahara våldtas av marockansk polis, och världen ser åt annat håll. Sveriges regering måste leva upp till sin feministiska utrikespolitik och agera, skriver Gabi Björsson, ordförande i Emmaus Stockholm.

Sedan vapenvilan mellan den västsahariska befrielseörelsen Polisario och ockupationsmakten Marocko bröts, har Marocko hindrat dem från att lämna sina hem, förhindrat dem tillgång till mat, medicin och behandling för skador orsakade av poliserna, utfärdat dödshot och genomfört offentliga förtalskampanjer, ofta på sätt som uppmuntrar till hat och våld mot aktivisterna.

I november 2020 har våld och trakasserier mot västsahariska kvinnor och flickor från polis och militär ökat dramatiskt. Poliser har vandaliserat och plundrat hem, misshandlat och torterat människorättsaktivister,

perfortis kaj torturis aktivistojn pri homaj rajtoj.

Emmaus, Stokholmo, admonas la regadon de Svedio:

- en plej eble fortaj vortoj kondamni la seksan kaj seksbazitan perforton kontraŭ okcidentasaharaj aktivistoj pri homaj rajtoj, ĵurnalistoj kaj iliaj parencoj
- atentigi al Maroko, ke Svedio kun granda maltrankvilo rigardas la kreskon de la perforto kontraŭ la civila loĝantaro kaj la militarigo de urboj en Okcidentasaharo kaj ke la regado daŭre sekvos la evoluon de okazoj.
- admoni Marokon fari paŝojn por sekurigi ke individuoj en la polico finu perforton kontraŭ civiluloj, kaj respondi farintojn de krimoj kontraŭ civiluloj.

Gabi Björsson, prezidanto de Emmaus, Stokholmo

Ankoraŭ neniu UN-sendito al Västsahara

La ĝenerala sekretario de UN ankoraŭ ne elektis novan senditon por Västsahara. La plej lasta, la germano Horst Köhler, antaŭe konfederacia prezidento, rapide demisiis post finfaro de du enkondukaj kunvenoj inter la du partneroj Maroko kaj Polisario Fronto.

Ambaŭ partneroj devas akcepti novan UN-senditon.

UN prezentis entute 13 kandidatojn por la posteno, Polisario neis al du el ili, ĉar ili estis malferme pozitivaj al la maroka propono pri aŭtonomio.

Temas pri rumana eksa ministro kaj portugala eksa ekstera ministro, rakontas Hiba Abdalla, la reprezentanto de Polisario en Svedio.

...”Maroko kontraŭe neis al 11 kandidatoj”, ... diras Hiba Abdalla.

Unu el ili estas la sveda diplomato Staffan de Mistura, kiu estis aktuala printempe 2021.

Lena Thunberg (la redaktoro de la magazino Västsahara)

Emmaus Stockholm uppmanar Sveriges regering att:

- i starkast möjliga ordalag fördöma det sexuella och könsbaserade våldet mot västsahariska människorättsaktivister, journalister och deras anhöriga.
- påtala för Marocko att Sverige ser med stor oro på våldeskaleringen mot civilbefolkningen och militariseringen av städer i Västsahara, och att regeringen fortsatt kommer att följa händelseutvecklingen.
- uppmana Marocko att vidta åtgärder för att säkerställa att individer inom polis och militär omedelbart upphör utöva våld mot civila, samt hålla förövare av brott mot civila ansvariga.

Gabi Björsson, ordförande Emmaus Stockholm

Ännu inget nytt FN-sändebud till Västsahara

FN:s generalsekreterare har ännu inte utsett något nytt FN-sändebud för Västsahara. Den förre, tysken Horst Köhler, tidigare förbundsprezident, avgick hastigt i maj 2019, efter att ha genomfört två inledande möten mellan de båda parterna Marocko och Polisario Front.

Båda parter i konflikten måste godkänna ett nytt FN-sändebud.

– FN har presenterat sammanlagt 13 kandidater till posten. Polisario har sagt Nej till två av dem, eftersom dessa var öppet positiva till det marockanska autonomiförslaget. Det gäller en rumänsk ex-premiärminister och en portugisisk tidigare utrikesminister, berättar Hiba Abdalla, Polisarios representant i Sverige.

– Marocko däremot har sagt Nej till 11 kandidater, säger Hiba Abdalla.

En av dessa är den svenske diplomaten Staffan de Mistura, som var aktuell våren 2021.

Lena Thunberg (redaktör för tidskriften Västsahara)



Hodiaŭ ĉiu povas eldoni elektronikan gazeton – ankaŭ vi!

Ora Ĵurnalo ja havas organizon kiel bazon, la Esperanto-Societo de Gotenburgo, sed la aŭstra revuo "La Bulteneto" havas tute privatajn eldonistojn. Iu ligo al la Esperanto-biblioteko de Vieno eble ekzistas. Jen prezentado:

La Bulteneto – dulingva magazino en Vieno

Ideo kaj granda parto de teksto kaj fotoj
Josef Kříž, ing.el Ĉeĥio – panglotia@gmail.com

En kunlaboro kun Renate kaj Walter Klag, Aŭstrio – esperanto@chello.at
nevendebla, privata eldono

La maldekstra paĝo – bildo pri la plej granda monera trezoro, trovita en Ĉeĥio. La kaldrono estas parte detruita.



La dekstra paĝo: bildo pri la Esperanto-biblioteko en Vieno

Esperanto-kursoj kaj ĉiĉeronado je mendo.

La redaktoroj tre interesiĝas pri moneroj – ju pli malnovaj, des pli bone. Jen

RAKONTO PRI LA TROVO DE LA ORA MONTREZORO DE PODMOKLO

La duan de junio 1771 norde de la vilaĝo Podmokly, la kamparano Jan Koch, nomita Janota, venis por falĉi herbejon ĉe la maldekstra bordo de la rivereto Podmoklo. La malalta deklivo estis iom disŝirita pro longdaŭra pluvo. Tie li ekvidis multajn "flavajn butonojn kun stranga desegnaĵo" en detruita ujo elterigita dank' al la pluvakvo.

Li pensis ke li trovis latunajn butonojn. Li metis ilin en sian poŝon kaj portis ilin hejmen – al la infanoj por ludo.

Kiam la infanoj ludis kun la "flavaj butonoj" sur la vilaĝa placo, alparolis ilin preterinta juda vendisto.

Den andra juni 1771, norr om byn Podmokly, kom bonden Jan Kock, som kallades Janota, för att slå gräset vid vänstra kanten av den lilla bäcken Podmoklo. Den låga branten var något sönderskuren på grund av långvarigt regnande. Där fick han syn på en mängd "gula knappar med konstiga tecken" i en förstörd behållare, som tack vare regnvattnet kommit i dagen.

Han trodde att han hade funnit mässingsknappar. Han stoppade dem i sin ficka och tog hem dem – till sina barn att leka med.

Li petis aĉeti la butonojn de la infanoj – unu peco kontraŭ unu "kreuzer". Eksciinte la lokon de la trovaĵo, la vendisto serĉis pliajn "butonojn" tie.

Lia intereso igis vilaĝanojn suspekti ke oro estis malkovrita ĉe la rivereto.

Poste multaj vilaĝanoj kuris tien por akiri iom de la ora trezoro. Estis tiom da moneroj ĉe la rivereto, ke neniu revenis hejmen kun malplena poŝo.

Pro pluvego iom post iom pliaj oropecoj aperis el la tero.

Venis vilaĝanoj de la malriĉa malgranda vilaĝo Podmoklo al laboristo Janota por ege danki lin, ke li plibonegis ilian vivon plenan de mizero kaj malfacileco. Tiutempo la tuta Ĉeĥa lando matsategis.

La historio ne finas tie, sed estas tro longa por Ora Ĵurnalo. Vi ja havas la adreson al la magazino. Pliaj rubrikoj estas: "Kiu estas la laŭleĝa posedanto de la trovaĵo?", "La sorto de la monertrezoro?", "Pri la vivsituaĵo ĉirkaŭ 1771". "La oraj moneroj kaj la bronza kaldrono", "La valoro de la trezoro" k.t.p.

Interese ke personoj el du landoj kunlaboras pri magazino, sed la moderna tekniko ja ebligas tion. /Siv

När barnen lekte med de "gula knapparna" på bytorget, blev de tilltalade av en judisk köpman, som gick förbi. Han bad att få köpa knapparna av barnen – en knapp mot en "kreuzer". Då köpmannen fått veta fyndplatsen, sökte han efter fler "knappar" där.

Hans intresse fick byborna att misstänka att guld hade upptäckts vid bäcken.

Sedan sprang många bybor dit, för att få tag på något av guldsalten. Det fanns så mycket guldmynt vid bäcken, att ingen återvände hem med en tom ficka.

På grund av mycket regnande kom så småningom ytterligare guldmynt upp ur jorden. Bybor från den fattiga lilla byn Podmoklo kom till lantarbetaren Janota för att varmt tacka honom för att han hade förbättrat deras liv, som varit fullt av misär och svårigheter. På den tiden rådde hunger i hela Tjeckien.



"Ĉiuj steloj etas nokte" – enhavas mikronovelojn



Ĉu vi pensas ke multaj esperanto-libroj enhavas tro da paĝoj? Ĉu mankas al vi tempon por legi? Tiukaze mikronoveloj estas por vi.

Ĉiuj steloj etas nokte – Filmetoj – uea.facila!

<https://uea.facila.org/filmetoj/%C4%89iuj-steloj-etis-nokte-r138/>

- En tiu ĉi mallonga filmeto Paulo S. Viana proponas al vi legi la freŝe aperintan libron: Ĉiuj steloj etas nokte.
- Paulo S. Viana ankaŭ mem kontribuis per mikronoveloj.

Kaj – ĝoje mi trovas tri mikronovelojn de Laure Patas d'Illiers – nia membro en la librorondo pri "Sesdek ok". Fakte ŝi gajnis

la unuan premion. Gratulojn, Laure!!!! Oni ne povas rapide legi la novelojn (kun malpli de 100 vortoj). Oni devas pripensi la ofte kaŝitan duoblan sencon!

• La antologio enhavas mikronovelojn verkitajn de novaj kaj malnovaj aŭtoroj. La prezento estas bone komprenebla kaj ĝuebla.

Ĉu laŭ via opinio la filmeto estas facila aŭ malfacila? /Siv

El Göteborgs-Posten, dimanĉe la 12an de septembro

La voĉdona rajto por virinoj celebras la 100-jaran datrevenon. Ulrika Knutson verkas.

La bildo montras virinojn survoje por voĉdoni la unuan fojon la 12an de septembro, 1921

Du el la pioniroj en la parlamento estis la liberaloj Kerstin Hesselgren kaj Elisabeth Tamm.

Tamen Elisabeth Tamm estis skeptika: "la politiko estas ludo, tranĉita de la reala vivo".

Kerstin Hesselgren estis pli optimisma kaj ĝuis la debatojn kaj kompromisojn en la parlamento. Ŝi restis en la parlamento dum pli ol 20 jaroj. Ŝi faris 129 proponojn, pli ol iu ajn parlamentano. La plejparto temis pri virinaj aferoj. Malgraŭ ke la parlamento malkonsentis pri la plejparto, Kerstin Hesselgren rigardis la preparon de la proponoj en la komisionoj kiel edukon al viraj parlamentanoj "Vere valora popololeduko", ŝi diris. /Siv



SUFIKSO -UM – interrete trovita de Inga Johansson

Kelkaj ekzemploj pri la uzo de -um-:

1. Mi volonte **plenumis** lian deziron
2. En malbona vetero, oni povas facile **malvarmumi**.
2. Li prenis ĵurnalon kaj komencis **foliumi**.
3. Mi petis al Minicia akvumi por mi la **plantojn**.
4. Ili komencis malvarmigi per **ventumiloj**.

-UM-
(sufikso)

La virino **sapumas** siajn manojn

Ili komencis malvarmigi per **ventumiloj**

Eble ŝi estas malsana, ŝi **malvarmumis**

La filo **brakumas** la patron

Parolu Esperanton!



Programo MIA AMIKO

Retaj Kursoj de Esperanto

Movimento Virtual de

Esperanto no Brasil

Esperanto@Brazilo

<http://esperanto.brazilo.org>

Importante (portugale): O sufixo -UM- e a preposição JE, como elementos coringas, eram mais usual no início do Esperanto quando as palavras e expressões ainda estavam sendo testadas. Atualmente, eles não são tão utilizados na mesma frequência. Mas há palavras e expressões os utilizando que são bem estabilizadas e reconhecidas internacionalmente. No entanto, teoricamente, podem ser empregados em conceitos novos de interpretação, desde que a comunidade esperantista internacional os compreenda e não sinta que há um substituto à altura para eles, dentro do próprio contexto do Esperanto.

(Kelkajn vortojn vi komprenis, ĉu ne?)

Sur eta insulo – Inga rakontas



Sur malgranda insulo en la Stokholma insularo kelkaj homoj kolektiĝis por kunvivi, manĝi kaj ferii dum semajno en julio 1984. Bertilo Wennergren instruis tie esperanton per sugestopedio, pedagogiko en kiu la lernantoj devas alpreni diversajn fikciajn personecojn:

Venis Pedro el Hispanio, profesie reĝisoro kaj kun atenta rigardo super ni ĉiuj, malgranda Kristina el Francio, la islandanoj Bjarni kaj Baldur, unu vikingsimila poeto, la alia gaja vagabondo kun pacaj marŝoj en la estonto, eble ie en Francujo. Ankaŭ malproksimaj

På en liten ö i Stockholms skärgård strålade några människor samman för att bo, äta och semestra tillsammans under en vecka i juli 1984. Bertilo Wennergren undervisade där esperanto via sugestopedi, en pedagogik där deltagarna ska anta olika påhittade personligheter:

Dit kom Pedro från Spanien, till yrket regissör och med en vakande blick över oss alla, lilla Kristina från Frankrike, islänningarna Bjarni och Baldur, den ene vikingalik poet, den andre en gladlynt luffare med fredsmarscher i sikte

gastoj ne mankis – Huiŝan, simpatia masonisto el Ĉinio kaj avino Jolanda el Brazilo.

Eta Mim-simila "Slaktar-Olga" el Ĉeĥio feliĉe saltis ĉirkaŭen kaj ordigis du infanojn kaj Martin, muzikiston de Luleå.

Slaktar-Olga ankaŭ faris la plej bongustajn benjetojn, kiujn vi povas akiri.

Jamej, ina detektivo el Ĉinio portis ĉie sian malgrandan filon, kiu kun sunvarma rideto salutis ĉiujn kun heeereeĉiutage.

La piloto Bob el Usono kaj lia filo Kristian ĉiutage nokte fiŝkaptis, sed ne estis sukcesoj. Joshiko el Japanio ofte sidis sur la verando kaj filozofiis. Hans, el Aŭstrio, estis kantisto kaj dancisto, kiu aranĝis ĉiunokte la societan vivon apud la kameno. Vasilika, kiu volonte lasis sian filinon sur la sino de Baldur, venis el Grekujo kaj ŝvebis kiel greka diino.

Ŝia samlandano Melina, bona bakistino kaj financa administranto, certigis, ke neniu en la grupo bezonas malsati dum ĉi tiu mirinda internacia semajno.

naĝonstans i Frankrike. Långväga gäster saknades inte heller – Huiŝan, en sympatisk murare från Kina och mormor Jolanda från Brasilien.

Lilla My-liknande "Slaktar-Olga" från Tjeckien skuttade glatt omkring och höll ordning på två barn och Martin, en spelman från Luleå.

Slaktar-Olga lagade dessutom de allra godaste munkar (benjetoj) man kan få.

Jamej, kvinnlig detektiv från Kina bar omkring sin lille son, som med ett sol-vargsgryn hälsade alla med heeereeĉi varje dag.

Piloten Bob från USA och sonen Kristian gick på fisketur varje kväll, men inte blev det några napp. Joshiko från Japan satt ofta på verandan och filosoferade. Hans, från Österrike var en sång- och dansman, som varje kväll fick fart på sällskapslivet vid den öppna spisen. Vasilika, som gärna lämnade dottern i knäet på Baldur, kom från Grekland och svävade likt en grekisk gudinna. Hennes landsmaninna Melina, en duktig bagerska och ekonomiföreståndare såg till att ingen i gänget behövde svälta under denna underbara internationella vecka.

La velboato



Viro sidis en tre malgranda velboato dum rivera fiŝkaptado. Estis preskaŭ senventa, tamen kun la helpo de la velo li povis resti preskaŭ en la sama loko kvankam la fluo estis forta. Subite li malkovris, ke lia ligna skatolo kun fiŝkaptaj iloj falis eksterŝipen. Ĝi estis

apenaŭ videbla super la akva surfaco cent metrojn laŭflue.

Kion li faru? Li ne havis remilojn kaj eĉ se li refus la velon, kaj li kaj la kesto drivus tiel rapide kiel la fluo.

Jes, li elpensis simplan solvon, sed necesus iom da tempo por efektiviĝi ĝin.

Li boardu. Sed kiel, kiam estis senventa?

Nu, se vi konsideras kaj la boaton kaj la keston kiel du objektojn sur senmova surfaco, tiam la ventrapideco estus egala al la

flurapideco de la rivero. Tiel li povis boardi laŭflue helpe de la malforta kontraŭvento. Verŝajne necesus longa tempo por atingi la skatolon, sed funkcius!

/Lasse Granat



Josef Kříž – kiel mi esperantiĝis

(okaze de la 30-jara esperantiĝo) – aktualigo 2021
(46 jarojn por kaj per esperanto)

(Vi foje renkontis la nomon Josef Kříž lige al artikoloj.
Mi demandis al li rakonti ion pri si mem. Jen lia rakonto. /Siv)

Mi naskiĝis la 17an de junio 1943. Estinte ankoraŭ malgranda knabo, mi interesiĝis pri kolektado de diversaj objektoj, kiuj kutime fariĝas torĉoj de intereso por multaj junaj kolektantoj en nia geografia regiono.

En mia kazo foje interesis min poŝtmarkoj, aliffoje glumarkoj, kiujn oni povas vidi sur skatoletoj por alumetoj – temas pri filumenio, bildkartoj-poŝtkartoj (filokartio), ŝirmkovraĵoj de raziloj, insignoj ..., certe mi povus daŭrigi ..., sed plej multe el ĉiuj objektoj mi, kiel malgranda knabo, preferis poŝtmarkojn.

En la jaro 1957, kiel la 14-jara studento de Kemia faka mezlernejo en orientĉeĥia distrikta urbo Pardubice, mi decidis interŝanĝi ilin kun eksterlandanoj. Unuajn leterojn, per kiuj mi intencis ekligi kontaktojn kun eksterlandaj kolektantoj, tradukis por mi tre volonte en la anglan mia tiama profesoro de historio, kiu mem regis kelkajn fremdajn lingvojn, ekzemple la anglan, francan, hispanan, germanan kaj la italan.

Tiam mi rapide spertis, ke mi ne estas bone preparita por mia decido korespondi

eksterlanden ... do, ke mankas al mi konoj de almenaŭ du, precipe – tiel dirite – ”okcidentaj” lingvoj.

Krome la rusa lingvo, kiun mi komencis devige lerni jam en la kvara klaso de baza lernejo en la jaro 1953, mi ĵus en la jaro 1957 komencis lerni la germanan en la unua klaso de la menciita Kemia faka mezlernejo.

Post maturekzameno en la jaro 1961, kiam mi ekis labori en la granda kemia entrepreno Asocio por kemia kaj metalurgia produktado en la urbo Ústí nad Labem (Ústí apud la rivero Elbo), mi tie daŭrigis studon de la germana lingvo.

En mia nova loĝloko – en Ústí n. L, kie mi komencis labori – mi jam komencis eĉ praktiki ĝin, ĉar en la ĉelima regiono loĝis tiam ankoraŭ multaj miksitaj ĉeĥaj-germanaj familioj. La konoj de la germana lingvo plifirmigis mian decidon por ĝia plua studo en Kemia Teknologia Altlernejo (KTA) en **Pardubice**, kie mi intertempe – en la jaro 1962 – komencis studi kemion.



Pardubice.

Motivo de mia decido – daŭrigi en la germana – estis tre simpla: en ĉiu tri-semestra lingva kurso en KTA oni ĉiam komenciĝadis per bazaj gramatikaj reguloj, kaj mi volis eviti stud-problemojn en aliaj objektoj kaj koncentriĝi por studo – precipe de matematiko kaj fiziko.

Sed ho, ve! Nia tiama klas-instruisto tuj komence de la studo tute detruigis mian planon – laŭ la regulo: **ne estas permesite studi la saman lingvon en altlernejo, kiun vi studis en mezlernejo.** Do, mi timiĝis kaj ekis studi – tiam kontraŭ mia volo – **la anglan.** Nur kelke da jaroj pli malfrue mi devis konfesi, ke tiama severa regulo, kiun oni praktikis en la altlernejo, estis vere prudenta kaj rimarkinde helpis al mi posedi konojn de la plua fremda lingvo.

En la jaro 1968 – post mia deviga unujara armea servo – mi ekis denove labori – nun kiel kemia inĝeniero. Fakte mi revenis al jam menciita granda kemia entrepreno, de kiu mi ricevadis dum la tuta kvinjara altlerneja studo stipendion.

En Ústí mi aliĝis en la jaro 1972 al trijara studo de **la franca lingvo**, ĉar post studoj de la germana kaj la angla ŝajnis al mi, studi la pluan lingvon pli facile. Mi studis ĝin en lingvolernejo post mia labortempo du horojn semajne. Precipe la lingvoj – **rusa, germana** kaj la **angla** servis al mi por tre ofta korespondado kun gekolektantoj el la tuta

mondo por interŝanĝi poŝtmarkojn, monerojn, gramofondiskojn kaj diversajn suvenirojn. Miaj deziroj ekde infanaĝo plenumis sin. Tiam mi ankaŭ fieris jam per kvinjara membreco inter miloj da klubanoj de tiel nomata Oceana Interŝanĝa Klubo (angle: Oceania Exchange Club), kies sidloko tiatempe situis en Nov-Zelando.

Pripensante, pri kiu lingvo mi plivastigos miajn almenaŭ pasivajn lingvokonojn, kiujn mi praktikadis plejparte nur en skriba formo, mi hezitis, ĉu plua centro de mia intereso estos la lingvo **itala** aŭ la **hispana**.

En tiu momento – oni skribis la jaron 1975 – mi hazarde diskutis pri mia "problemo" kun mia konato Rudolf Rychlý, kiu tuj solvis mian hezitationon, dirinte: "Se vi ankoraŭ ne scias, kiun pluan lingvon studi, venu al ni." La vortoj "venu al ni" estis por mi tro malklara propono, tial mi demandis, kion tio signifas?! Lia pli klara respondo sonis: "En nian **Esperanto-rondeton** en Domo de kulturo".

Mi tiam sciis, ke esperanto estas la lingvo internacia, sed fakte tio estis mia unusola scio pri ĝi – neniu alia! Kvankam en la pasinteco mi multfoje sopiris prospekti pli multe pri esperanto, fakte min multe okupis miaj hobiaj. Veni al la Esperanto-rondeto – tio estis okazo konatiĝi kun la lingvo kaj eble eĉ eklerni ĝin en la grupo da 11 aliaj kursanoj. Kondiĉoj de la rondeto por studi la lingvon estis tre favoraj – 80 kronojn por la tuta studjaro ... la instruisto prezentis sin tre modeste, preskaŭ malkuraĝe **kiel s-ro Jiří Kořínek**. Nur iom pli malfrue mi eksciis, ke li apartenas al plej famaj esperantistoj ne nur en nia lando, sed ankaŭ mondscale.

Jiří Kořínek. 1906–1988.
Ĉeĥo; komerca komizo,
teksa kvalitatkontrolisto.
Naskiĝis en Liberec.
Ekkonis Esperanton en
1922, aktiviĝis por



Esperanto en 1947. Abunde verkis poemojn kaj tradukis, kaj havis plurajn volumojn en manuskripto. Liaj verkoj aperis en ĉiuj ĉefaj gazetoj. Ofte premiita en la Belartaj Konkursoj. Multe tradukis por Slovaka Antologio, 1980. Wikipedia

Kion mi dezirus pli multe por mia celo?

Dank' al miaj antaŭaj lingvo-studoj, ŝajnis al mi esperanto tre simpla. Ĝi kaptis min per sia regula gramatiko kaj per siaj preskaŭ senfinaj ebloj de vortfarado. Mi eluzadis tiam por ĝia lernado preskaŭ ĉiun mian liberan tempon. Ĉar mi intencis tre rapide eklerni ĝin, mi komencis prepari propramane bild-vortaron, eltranĉante gajajn desegnaĵojn el tiama ĉeĥa satirika gazeto DIKOBRAZ (esperante: histriko), al kiuj mi alskribadis (helpe de vortaro) esperantajn ekvivalentojn. Ĉi tiu vortaro fariĝis por mi tre grava lerniga helpilo, dank' al ĝi – havante foto-memoron – mi eklernis multajn, precipe ne tro frekventajn vortojn.

Jam post la kvar-monata studo de la lingvo mi kapablis tralegi kriman romanon "Ferio kun la morto". Tiu sukceso ankoraŭ pli multe motivis min al pli intensa studo.

Bedaŭrinde la naŭmonatan kurson mi devis ĉesi kontraŭ mia volo jam en majo 1976, ĉar mi ricevis inviton al ekzerco por armeaj rezervistoj. En tiu tempo mi jam restis fakte nur unusola kursano el la tuta – origine dekdukapa grupo. La lastajn lecionojn de la lernolibro de nia konata instruisto **Theodor Kilian**, kiu verkis ĝin, mi devis trastudi mem nur kiel hejmtaskon.

Jam dum la kurso kaj eĉ pli poste mi provis esperantigi kelkajn interesajn artikolojn kaj petis mian tiaman instruiston s-ron Kořínek, ke li kontrolu ilin. Mi devas diri, ke li ĉiam tre pozitive pritaksis miajn penojn, malgraŭ ke li ĉiam devis ripari kelkajn erarojn.

Mia penado ne estis vana kaj post unu jaro mi povis konstati, ke mi regas pli-malpli la

lingvon pasive. Sed por ĉiu lernanto estas plej grave regi la lingvon aktive! Tiu momento venis unue en la jaro 1976. Mi estis ano de grupo de moner-kolektantoj, kiu vizitis siajn kolegojn en saksa urbo Pirna. Tie mi hazarde konatiĝis kun emerita gimnazia profesoro **s-ro Sigismun Szymanski**, kiu tre bone regis esperanton. La renkontiĝo ebligis miajn longtempajn reciprokajn kaj korespondajn kaj personajn kontaktojn.

La dua – plej grava okazo por mi okazis en la jaro 1990, post kiam venis al nia urbo brito **Richard (Riĉjo) Howard**, kiu fariĝis instruisto de la angla lingvo en tiama Pedagogia fakultato en Ústí n. L. Ĝia tiama dekano d-ro Novobilský venigis lin en nian E-klubon, kie ni konatiĝis. Liaj perfektaj lingvokonoj ankoraŭ pli multe motivis min, malgraŭ ke post la kvinminuta telefonparolo kun li mi estis ege ŝvitinta pro tremo kaj pro manko de parolspertoj. Mi ĉiam volis esti proksime al li kaj kune interparoli – ne ĉeĥe, sed esperante, malgraŭ ke liaj lingvokonoj de la ĉeĥa lingvo estis tre alte taksataj. Kaj male – li ne volis paroli kun mi angle, ke li ne havu kontraŭ mi avantaĝon, ĉar la angla estas lia gepatra lingvo. Tial ni uzis la lingvon neŭtralan despli, ke en nia lando tiam komenciĝis serioze praktiki demokratiaj principoj.

Miaj oftaj interparoloj kun Riĉjo kaj mia plua studo ebligis al mi pli kaj pli ofte partopreni aktive Esperanto-movadon – ne nur sur la teritorio de nia lando sed ankaŭ eksterlande. Miaj aktivaj translimaj kontaktoj kun la saksaj esperantistoj ekz. el Pirna, Dresden, same kiel nove ligitaj kontaktoj en la jaroj 1991–2000 kun geesperantistoj el Leipzig, Halle, Kronach, Forchheim, Pettensiedel, Norimberk, Magdeburg kaj el la urboj Hennebont (Francio), Chiavari (Italio), Kiskunhalas (Hungario), Lund (Svedio) ebligis al mi prezenti prelegojn al aktualaj temoj dum diversaj enlandaj kaj eksterlandaj E-seminarioj. Inter ili estis por ekzemplo la plej gravaj:

1. Ŝtata registrilo de emisioj de haladzoj kaj fontoj de malpurigado de la atmosfero (Seminario SAEST 1980, Ústí nad Labem)
2. Vivomedio de Nordĉeĥia regiono – "Ulceroj" de Eŭropo (Internacia festivalo 1990/91, Kassel-Sensenstein, Germanio) – la prelego estis elektita inter tri plej interesajn prelegojn de la tuta aranĝo
3. Interrilatoj inter ĉeĥoj kaj germanoj en spegulo de la tempo (Feria semajno 1994, Kronach, Germanio-Bavario)
4. Vivomedio de Ĉeĥa respubliko (81a Universala Kongreso de Esperanto, Praha, 1996)
5. Kvinjara jubileo de agado de la asocio Eŭroregiono Elbe/Labe (Kronach + Leipzig, Germanio, 1997)
6. Andreo Cseh – rimarkinda persono de la monda E-movado (BELO-konferenco 1998, Kronach, Germanio)
7. Historio kaj samtempo de esperantaj internaciaj transpagiloj (JAZAF 1998, Chemnitz, Germanio)
8. La unua ŝipveturo de la unua ĉeĥa vaporŝipo "Bohemia" en la jaro 1841 de Mělník al Dresden (JAZAF 1999, Pirna-Coswitz, Germanio)
9. La rivero Elbo – nia ligilo en Eŭropon (JAZAF 2000, Leipzig, Germanio – cirkuliga pokalo por plej bona prelego)
10. 10-jara jubileo de translima kunlaboro enkadre de la asocio Euroregiono Elbe/Labe (Jarkunveno de BELO, Kronach 2003)
11. Radono en vivomedio – ĉu nevidebla danĝero por nia sanstato? (JAZAF 2003, Dorf Wehlen, Germanio)
12. Kalkulmoneroj ka ĵetonoj (Jarkunveno de BELO, Forchheim 2005)
13. Bertha von Suttner – 100-jara jubileo de ŝia Nobelpremiigo por paco (1905-2005) – Jarkunveno de BELO, Pinswang (Aŭstrio) 2007
14. De Petr Ginz ĝis raketoplano Columbia – tragedia sorto de juna praga knabo, kiu pereis kiel ja 16jara en Osvětim-Březinky (germane: Auschwitz-Birkenau)
15. Princolando de Hutt-rivero – malgranda neaprobata ŝtato en okcidenta Aŭstralio, kies oficialaj lingvoj estas la angla, franca kaj esperanto.
16. Preskaŭ tragedia sorto de knabino kun tilio sur ĉeĥoslovaka unukrona monero de la jaroj 1957–1992
17. Vivo kaj laboro de Prof-ro D-ro de teĥnikaj sciencoj Viktor Kaplan maŝinkonstrua inĝeniero, inventisto kaj altlerneja pedagogo.
18. Plej granda eŭropa ora trezoro, trovita proksime de la vilaĝo Podmokly, distrikto Rakovník
19. Atenco sen senco – kiel oni volíŝ mortigi tiaman princon Ferdinand V.-"La Bonvolema"

Mia esperanta vivo estas ĉijare 46-jara. Ĉar la ĉeĥa lingvo estas mondscale tre malofte parolata, mi decidis eklerni post la studo de la lingvoj rusa, germana, angla kaj franca eĉ la lingvon internacian – esperanton. Mi estas konvinkita, ke ĉi tiu nobla ideo de la internacia lingvo havos pli frue aŭ pli malfrue ŝancon solvi plej grandan kaj ardan problemon de la homaro – vastan reciprokan interkompreniĝon. Mi kredas, ke tempo de la lingvo esperanto ankoraŭ venos. Al ĉi tiu ideo mi volas dediĉi reston de mia vivo. /Josef

Inbjudan till esperantokurs

Studieförbundet Vuxenskolan startar sin verksamhet fysiskt och inte längre bara digitalt. Vi tänker också vara med och har bokat in lokaler för hösten på Redbergsskolan, B-ingången, våning 3. Koderna skickas till anmälda deltagare.

De föredragsserier vi haft, som går under namnet folkbildning kommer huvudsakligen att ges under våren, då vi förhoppningsvis åter kan ha hela esperanto-lördagar.

Kurser i esperanto känns nu som det viktigaste. En esperantoförening utan esperantotalande, känns inte bra. Då vi deltog i Bokmässan hade vi möjlighet att få kontakt med nya kursdeltagare. Vi har inte möjlighet att delta i år. Nu litar vi på er, medlemmar.

Kära medlem! Tag med en god vän, en granne, barn eller barnbarn till en kurs för alla åldrar och med blandade kunskaper. Kanske en bra gemensam aktivitet över generationsgränserna? På sikt behöver vi få fram fler lärare. Därför tänkte jag att vi kunde arbeta så här: Jag ansvarar att kurser erbjuds, och välkomnar medarbetare!

Efter gemensam genomgång (första gången av uttal och minigrammatik), går grupper till olika rum. I varje grupp finns minst en esperantist, gärna en "blivande lärare", som hjälper nybörjarna. Alla har fått med sig några frågor att besvara. Sedan samlas vi åter i största salen för genomgång.

Därefter arbetar vi med ett bestämt tema, tränar in orden, går i grupper som med hjälp av frågor sedan kommer tillbaka och gör en

gemensam presentation, som alla får lyssna på.

Om tiden tillåter kan vi lyssna till en känd saga på esperanto, lite esperantohistoria, leka 20 frågor, sjunga eller hitta på något annat, som deltagare föreslår. Viktigt är att nya deltagare tidigt får höra esperanto talas.

Jag har bokat in lokaler kl 10–12 på följande sju lördagar:

25/9, 9/10, 30/10, 13/11, 27/11, 11/12, 18/12.

Studieförbundet Vuxenskolan fordrar alla data på blivande kursdeltagare FÖRE kursstart. Vi har gratis lokaler med krav på närvarorapportering. Om det ska bli någon kurs behöver jag veta **personnummer, namn, postadress, e-postadress och tel.nummer på varje deltagare så snart som möjligt. Jag vill också gärna veta ev tidigare esperantokunskaper.** För att kunna ha lagom avstånd får vi sätta en gräns för antalet deltagare.

Kanske kan vi också ha en kurstid samma dagar kl 13–15. Förhoppningsvis har ingen annan då hunnit boka in lokalerna den tiden

Kurserna är i princip gratis, men för material och kursbok samt lexikon tar vi självkostnadspris.

Varmt välkommen!

Siv Burell kursansvarig. Mejla mig på siv.burell@gmail.com eller ring: 070-721 34 79